

Pri la farado de prelegoj

Al mia nuna tria postkongresa artikolo instigis min la prelego de Humphrey Tonkin “Kiel efektive paroli publike”. La tre konata preleganto, eksprezidanto de UEA, fondinto kaj nuna prezidanto de ESF (*Esperantic Studies Foundation*), membro de la Akademio de Esperanto ekde 1983 (ktp., ktp.) pritraktis multajn aferojn rilatajn al la temo. I.a. li menciis, ke kiu volas aŭ devas paroli publike eksciu antaŭe kiuj estos la alparolotoj, kio ne povos esti dirata (pro la aparta kulturo, religio, sinteno de la ĉeestantoj), kia estos la loko, ĉu la akustiko estos bona, ĉu ekzistos bona mikrofono ktp.

Tamen en ĉi tiu artikolo mi ne volas resumi la tutan prelegon, sed nur paroli pri specifa publika parolado, nome pri prelegoj (rilate al kiuj ankaŭ validas la antaŭzorgoj menciitaj de Humphrey Tonkin: koncerne al la aparta publiko, prelegejo, mikrofono ktp.).

Estas tre kompetentaj, kelkfoje eĉ internacie konataj prelegantoj kiuj allogas kaj entuziasmigas sian publikon sen uzi – krom mikrofono – iun ajn help-rimedon (projekciilo, skribtabulo k.s.).

Tamen tio ne estas la kutima situacio. Plej multaj prelegantoj bezonas - kaj fakte uzas - tiajn help-rimedojn, nuntempe ĉefe projekciilojn kaj la ilon PowerPoint. Pri ĝi mi parolos poste.

Ne nur bonaj mikrofono kaj akustiko gravas, sed ankaŭ la voĉo, la elparolado kaj la prononco de la preleganto. (Vidu mian artikolon “Kio malfaciligas la komprenon de parolata Esperanto” de la 5-a de septembro de 2017.)

Oni konas bonajn prelegantojn, t.e. kiuj bone regas sian temon kaj havas bonan manieron prezenti ĝin, sed kiuj havas voĉan problemon (ekzemple tre raŭkan voĉon), ne bone artikulacias aŭ havas neordinaran prononcon, fortan akĉenton, kiun plejmultaj ĉeestantoj ne bone komprenas. Tiaj prelegantoj – bonaj aŭ malpli bonaj – devas provi plibonigi la voĉon, klopodi plibonigi la artikulacion kaj lerni la ordinaran prononcon, sen tre forta akĉento. Bedaŭrinde kelkaj el la prelegantoj konsiderataj kiel bonaj ne ŝajnas opinii tion grava. Unufoje mi ĉeestis anglalingvan prelegon de maljuna viro – prezentita kiel “internacia” preleganto –, kiu, krom havi fortegan alilingvan akĉenton en la angla, ŝajne ne havis dentojn. Vi povas imagi lian artikulacion kaj ke preskaŭ ne eblis kompreni lin.

Rilate al la uzo de PowerPoint mi opinias memkomprenebla la jenon (sed plejofte vidas, ke la prelegantoj faras ion alian):

1. La skribaĵoj (la literoj) ne estu tro malgrandaj; ili devas esti facile legeblaj.
2. La lumbildoj ne estu plenaj de skribaĵoj; en ĉiu lumbildo oni skribu nur kelkajn – fakte malmultajn – vortojn, prefere ne tutajn frazojn (escepte kiam temas pri citaĵoj).
3. La preleganto parolu pri tio, kio estas skribita sur la lumbildo, ne pri aliaj aferoj.
4. Kiam oni uzas figurojn, ili devas klare illustri tion, kio estas dirata. Oni ne diru ion, kio ne rilatas al la figuro – kaj inverse.
5. Oni ne uzu PowerPoint-dosieron jam uzitan en antaŭa kaj pli longa prelego sen igi ĝin malpli longa, t.e. sen adapti ĝin al la nova, pli mallonga prelego.

Bedaŭrinde:

- pluraj prelegantoj ne faras tion, kion mi menciis en la punkto 5; sekve ili montras rapide diversajn lumbildojn sen komenti pri ili. La ĉeestantoj provas legi la skribaĵojn sur la lumbildoj, sed la preleganto parolas pri io alia, kaj tio konfuzas la publikon kaj malplibonigas la prelegon;
- oftege prelegantoj (eĉ konataj kaj alimaniere bonaj) montras lumbildon sur kiu troviĝas multaj frazoj, frazpartoj aŭ vortoj – kiujn la ĉeestantoj provas legi – sed la preleganto diras samtempe ion alian. Ankaŭ tio konfuzas la publikon kaj malhelpas la komprenon. Do oni ne faru tion. Kontraŭe – kiel mi diris en la punkto 3 – oni parolu nur pri tio, kio estas skribita sur la lumbildo, ne pri aliaj aferoj.

Finante la artikolon, mi aldonas, ke – ankaŭ bedaŭrinde – estas prelegantoj, konataj aŭ ne, kelkfoje eĉ invititaj el eksterlando, kiuj NE uzas PowerPoint aŭ alian help-rimedon, sed ne scipovas fari bonan prelegon, parolante

- monotone,
- aŭ/kaj sen doni la necesajn eksplikojn (ekzemple pri uzitaj fremdlingvaj vortoj),
- aŭ/kaj sen klara strukturo de la enhavo.

Kial oni invitas ilin? Ĝenerale ĉar ili bone konas la temon de la prelego – kiel okazas kun kelkaj (aŭ multaj) profesoroj, kiuj ankaŭ bone regas sian studfakon, sed ne scipovas bone instrui.